9 Août	Les pronoms relatifs. Les mots invariables. Les verbes irréguliers.	Conversation libre sur les sujets étudiés (Revision).	Soirée d'adieu.
10 Août	Départ des participants		

N. B. : La présence d'Espérantistes français au château pendant cette période est très souhaitable pour permettre de rendre plus vivantes les séances d'études pratiques.

Quatrième Période

10 - 31 Août 1958 (Arrivée le 10, départ le 31)

SEMAINES ESPÉRANTISTES ET CULTURELLES

Chaque jour :

9 h. - 11 h. 45 : **3 Cours d'Esperanto :**

Mme Guillot : cours pour débutants.
M. Babin : acquisition de la pratique de la langue.
M. Guillot : utilisation pratique, étude de texte, grammaire, pédagogie.

14 h. - 16 h. : **Cours de reliure** : professeur, J.-C. Dupuy.
Cours de vannerie :

17 h. 30 - 18 h. 30 : **Séance de conversation** sous la conduite des professeurs.

Possibilités de promenades, bains (piscine du château), volley-ball.

21 h. - 22 h. 30 : **Soirées récréatives ou culturelles** : chants et jeux en Esperanto, cinéma, danses, etc...

Dimanche 17 : journée libre : excursion ou promenade en commun.

Dimanche 24 : grande kermesse annuelle.

PROGRAMME DES SOIRÉES

Dimanche 10	Présentation des participants. Renseignements sur la vie à la Maison Culturelle.	Samedi 16	Chants, jeux, danses.
Lundi 11	Chants, jeux, danses pour tous.	Dimanche 17	Audition de disques.
Mardi 12	Chants. « Comment faire un « montage » (Thébaud).	Lundi 18	Chants, jeux, danses.
Mercredi 13	Chants, jeux, danses.	Mardi 19	Chants. « Histoire de la M.C.E. » (Micard, Président de la M.C.E.).
Jeudi 14	Chants. Présentation d'un « montage » (Thébaud).	Mercredi 20	Chants, jeux, danses.
Vendredi 15	Chants. Film illustrant le montage présenté la veille. Discussion.	Jeudi 21	Chants. Film. Discussion sur le film présenté.
		Vendredi 22	Préparation en commun de la kermesse.

Samedi 23	Préparation en commun de la kermesse.	Mercredi 27	Chants, jeux, danses.
Dimanche 24	Kermesse : feux d'artifice, bal.	Jeudi 28	Chants. Présentation d'un « montage » sur l'Esperanto (par un groupe de participants).
Lundi 25	Chants, jeux, danses.	Vendredi 29	Chants, cinéma, discussion.
Mardi 26	Chants. Présentation d'un « montage sur la M.C.E. (par un groupe de participants).	Samedi 30	Soirée d'adieu, bal costumé, programme récréatif.

Cinquième Période

Du 1er au 15 Septembre

Séjours de repos et réunions diverses

Un cours d'Esperanto, organisé et dirigé par l'U.E.F., est envisagé du 5 au 14 Septembre.

Membres abonnés bienfaiteurs 1958

PREMIERE LISTE

Mme Chevery, Angers	1.000 fr.
Groupe Espérantiste d'Angers	1.000 fr.
Gerrier Gilbert, Paris	1.000 fr.
Levrard Thérèse, Le Mans	1.000 fr.
Ciret Georges, Tours	1.000 fr.
Micard Henri, Epineux-le-Séguin	1.000 fr.
Total de la première liste	**6.000 fr.**

Nous espérons que notre prochaine liste sera longue. **Amis, ne nous oubliez pas, nous avons besoin de vous tous.**

Avis important

Chaque année, de nombreux espérantistes donnent tardivement leur adhésion aux stages que nous organisons. Ils compliquent ainsi considérablement une tâche déjà très lourde.

Un exemple : Je n'ai encore aucune inscription ferme pour les vacances de Pâques.

Il me faudra donc bientôt faire appel aux non-espérantistes ! Vous me le reprocherez, sans doute. Et pourtant, comment faire ? J'ai la charge d'une œuvre qui doit vivre et prospérer. Pour cela, à chaque vacance, notre château doit être plein.

Alors, qu'attendez-vous ?

Abonnez-vous et faites abonner vos amis...
Envoyez-nous vos photos des précédents séjours
Parlez de nos stages et envoyez-nous vos amis, vos élèves...
et venez vous-mêmes !

Esperantista Kulturdomo

Kastelo de Grésillon

BAUGÉ (Maine-et-Loire)

Francujo *Tél. 34*

Generalaj kaj Praktikaj informoj

La Kulturdomo kun bieno de la Kastelo Grésillon estas kolektiva posedaĵo de pluraj centoj da francaj samideanoj en kooperativa formo. Ĝia celo estas disponigi oportunan lokon kaj ĉion necesan por kolektiva vivo dum esperantistaj renkontiĝoj. Ĉefaj puntoj de ĝia programo dum somero estas instruado de la lingvo kaj organizo de restadoj por esperantistaj studoj. La belega kastelo, sur dekliveto en granda parko kun lageto estas tute taŭga ejo por prelegoj, debatoj kaj sana feria vivo.

SITUO

La Kastelo troviĝas je 2 kilometroj de la urbeto Baugé, kie oni povas trovi ĉion necesan : butikoj, bankoj, poŝto, k.t.p... La urbeto Baugé situas norde de Loire-valo, proksimume en la centro de triangulo montrita per la tri grandaj urboj : Angers (40 km.), Le Mans (60 km.), Tours (66 km.). La aŭtovojoj estas bonegaj.

FERVOJO

Relbusoj, en somero trifoje dum la tago. La fervojlinio estas tiu de Le Mans al Saumur, kunliganta du rapidliniojn. Venante el nordo, oni trapasu Parizon. Forira stacidomo en Parizo : Montparnasse, rapidvagonaroj al Le Mans. Taŭgaj horoj : matene le 9-a, vespere, la 18 h. 30 kaj la 19 h. 15 (kontroli kun somera hortabelo).

Forlasi la rapidvagonaron en Le Mans por tuj envagoniĝi en la relbuson al Saumur, elvagoniĝo en Baugé (petu helpon de la kontrolisto, por ne maltrafi la stacion).

Venante el sudo : tra Tours, veturi al Saumur kaj tie ŝanĝi por uzi la relbuson direkto Le Mans.

Ekzistas buso de Angers al Baugé.

Privataj aŭtoj kondukos la vojaĝantojn inter la stacidomo kaj la kastelo. En okazo de malfruo aŭ ia malfacilaĵo telefoni al la Kulturdomo : tél. N° Baugé 34 (franca elparolo : Boĵé, trentkatr').

Samideanoj kiuj venos el Parizo ĉirkaŭ la 22 h. 30 tamen trovos en la Kastelo manĝeton kaj pretan liton.

Kondiĉoj pri la restadoj dum Julio kaj Aŭgusto :

1.200 frankoj por unu tago en privata ĉambro.
1.100 » » » » en tri-lita ĉambro (kun izolata lito).
1.000 » » » » en komuna ĉambro (900 fkj por la subdekokjaraj gejunuloj).
25 % rabato por la subdekjaraj infanoj.
10 % rabato por tiuj, kiuj restos almenaŭ dum *tuta periodo*.

Plie : Specialan aliĝmonon :

a) 2.000 frankoj por la periodo « Kulturaj internaciaj Ferioj ».

1.500 frankoj por la periodo « La Franca lingvo al la eksterlandaj Esperantistoj ».

c) 1.500 frankoj par la periodo « Niaj Esperantistaj kaj kulturaj semajnoj ».

DUM SEPTEMBRO KAJ JUNIO

1.000 frankoj por unu tago en *privata ĉambro*.
950 » » » » en tri-lita ĉambro kun izolita lito.
850 frankoj por unu tago en komuna ĉambro.
800 por la subdekokjaraj gejunuloj.
25 % rabato por subdekjaraj infanoj.
10 % rabato por tiuj, kiuj restos almenaŭ dum 15 tagoj.

La prezoj estas kalkulitaj inkluzive ĉion escepte trinkaĵoj (malmultekostaj).

Nutrado : Laŭ franca maniero : matenmanĝo simpla — du abundaj manĝoj tagmeze kaj vespere — manĝeto je la 16-a : pano kun ĉokolado (inter la 16-a kaj la 17-a oni povas havi aparte pagotan kafon, teon...).

Oni bonvolu alporti siajn manĝ — kaj tualettukon.

Cambroj : Ne luksa meblaro, sed konvena lito kaj malvarma fluanta akvo. Memservado ĉe la unua etaĝo, de varma akvo.

Elektraj-konektiloj je 220 voltoj por raziloj. Dušejo sur la unua etaĝo.

Ekskursoj (proksimuma prezo) : Noktaj ekskursoj : 600-1.000 fr.F. plus enirprezo en kasteloj.

Tuttagaj ekskursoj : 1.500-2.000 fr.F. plus enirprezo en la kasteloj.

Dum la tuttagaj ekskursoj, la partoprenontoj kunportos el la kulturdomo malvarman manĝon.

Familioj : ili estas akceptitaj tute favore, sed ili bonvolu atenti ke la infanoj ne ĝenu la debatojn kaj paroladojn.

Cetere, infanĝardeno estas aranĝita speciale.

ALIĜILO

Nomo kaj antaŭnomo :
Adreso :
Mi elektas la periodon :
Mi alvenos la : (matene-vespere).
Mi foriros la :
Mi konsentos partopreni en vesper-klubo per :
paroladeto pri mia lando.
prezentado de lumbildo.
paroladeto pri la jena temo...
kantado, muziko, k.t.p.

En la 1958.

subskribo.

Periodoj planitaj dum la Somero 1958

UNUA PERIODO

De la 15-a de Junio ĝis la 14-a de Julio — **ESPERANTA-KURSO POR LA KOMENCANTOJ**

Samtempe — Trapasantoj karavanoj
Ripozrestadoj.
Promenadoj.
Ekskursoj.

DUA PERIODO

Kulturaj Internaciaj Ferioj

15-an Julio - 27-an Julio 1958

(Alveno : 15-7 ; foriro : 10-8)

LA MEZA HOMO FRONTE AL LA SCIENCO

Scienco kaj Kuracado
Scienco kaj Esperanto
Problemoj de Edukado
Gvidas : D-ro P. Neergaard (Kopenhago) ; D-ro kuracisto A. Albault (Toulouse) ; Inĝeniero R. Watier (Parizo) ; Profesoro P. Babin (Rochefort).

La Kulturdomo havas la honoron voki al la samideanaro por partopreno al Kulturaj Internaciaj Ferioj de la 15-a julio vespere ĝis la 27-a vespere. Tiu altnivela manifesto ĝin gvidos unu Doktoro, unu Doktoro kuracisto, unu Inĝeniero, unu Profesoro. Plie okazos ekskursoj komentitaj al historiaj kasteloj.

	8 h. 30	9 h. 30	11 h.	12 h. 30	14 h. 30	18 h.	19 h. 30	21 h.
Merkredon 16	matenmanĝo	**P. Neergaard** La sciencistoj kaj la socio (1)	**R. Watier** La inventistoj k. la inventoj (1)	tagmanĝo	Libera tempo	**H. Micard** Informado pri la vivo en la Kulturdomo	vespermanĝo	Interkona vespero
Jaŭdon 17	matenmanĝo	**A. Albault** Akuŝo sen doloro (1)	**P. Neergaard** La sciencistoj kaj la socio (2)	tagmanĝo	Promenado en Baugé	**Debato :** La lingvoj en scienca dokumentado (sub gvidado de Ing. Watier)	vespermanĝo	Kino
Vendredon 18	matenmanĝo	**R. Watier** La inventistoj k. la inventoj (2)	**P. Neergaard** La sciencisto kaj la socio (3)	tagmanĝo	Vizito al Angers		vespermanĝo	Partoprenant prezentas sian landon
Sabaton 19	matenmanĝo	**P. Neergaard** La sciencistoj k. Esperanto (1)	**A. Albault** Akuŝo sen doloro (2)	tagmanĝo	Libera tempo	**Kunveno :** La aŭdintaro demandas la prelegintojn pri la antaŭaj prelegoj	vespermanĝo	Partoprenant prezentas sian landon
Dimanĉon 20	matenmanĝo		**P. Babin** La edukado kaj la disvolviĝo de internacia komprenemo (1)	tagmanĝo	Libera tempo	Parolado pri la Loire kasteloj	vespermanĝo	Prezentado de filmo pri Loire kastel

	8 h. 30	9 h. 30	11 h. -	12 h. 30	14 h. 30	18 h.	19 h. 30	21 h.
Lundon 21	8 h. matenmanĝo	Tuttaga ekskurso al la kasteloj					vespermanĝo	Vidu **(1)**
Mardon 22	matenmanĝo	**P. Neergaard** La progressigo de popularscienca literaturo en Esperanto (1)	**R. Watier** La inventistoj k. la inventoj (3)	tagmanĝo	Libera tempo	**Kunveno :** La aŭdintaro demandas la prelegintojn pri la antaŭaj prelegoj	vespermanĝo	Partoprenanto prezentas sian landon
Merkredon 23	matenmanĝo	**P. Babin** La edukado kaj la disvolviĝo de internacia komprenemo (2)	**P. Neergaard** La pregresigo de popularscienca literaturo en Esperanto (3)	tagmanĝo	**Debato :** Lingvo-pedagogio adaptita al komerca kaj scienca interkomunikado (sub gvidado de Inĝ. Watier)	**H. Micard** Historio de la Kulturdomo	vespermanĝo	Kino
Jaŭdon 24	matenmanĝo	**A. Albault** Kion oni sciu pri okulmalsanoj	**P. Neergaard** Sciencaj kaj fakaj terminaroj en Esperanto	tagmanĝo	Vizito al la dolmeno	**Kunveno :** La aŭdintaro demandas la prelegintojn pri la antaŭaj prelegoj	19 h. ĉ. vespermanĝo	Nokta ekskurso al priluminitaj kasteloj Vidu **(2)**
Vendredon 25	9 h. matenmanĝo		**P. Neergaard** La bezono de bibliografioj pri la scienca literaturo en Esperanto	tagmanĝo	Libera tempo	**A. Albault** La mekanismo de Esperanto	vespermanĝo	Partoprenanto prezentas sian landon
Sabaton 26	matenmanĝo	**P. Babin** La baza edukado de Unesko	**P. Neergaard** La ebloj por fondiĝo de internacia universitato kun Esperanto kiel laborlingvo	tagmanĝo	Vizito al la malnova apotekejo	Resuma raporto pri la prelegoj kaj debatoj	vespermanĝo	Distra vespero
Dimanĉon 27	matenmanĝo		Kunveno de la prelegitoj kaj de la Estraro de E. K.D. : konkludoj pri la restado	tagmanĝo	Preparo por forveturo Vidu **(3)**			

(1) — Lundon 21-an : Tuttaga ekskurso.

Oni foriros je 8 h. 45 precize. Post vizito de la granda urbo Tours, oni veturos laŭ la bordo de la rivero Loire ĝis la urbo Amboise. Oni vizitos la kastelon, kies turoj por helica supreniro de ĉevaloj kaj veturiloj estas famaj, la terason kun bela vido kaj la tombejon de Leonardo de Vinci. Oni tagmanĝos en Amboise kaj poste veturos al la kastelo de Chambord, fama grandega palaco de Francisko la Unua. Revenante oni haltos ĉe la kastelo de Blois.

(2) — Jaŭdon 24-an : Nokta ekskurso.

Oni veturos je la 20 h. 15, al la Kastelo de Langeais, kiun oni rigardos kelkajn minutojn. Transirinte la riveron Loire oni veturos al la Renesancan kastelon de Azay-le-Rideau priluminita meze de sia parko. Revenante oni vidos la kastelojn de Rigny-Ussé kaj Saumur.

(3) — Dimanĉon 27-an : Fino de la kulturaj ferioj.

La foriro povas okazi jene :

al Parizo : vagonaro je 18 h. 30, ŝanĝo en Le Mans, alveno en Parizo je la 23 h.

Suden : vagonaro je 22 h. 30 direkto Saumur, ŝanĝo tie laŭ dezirata direkto.

Sed, de la 27-a de Julio okazos restado kun kurso de Franca Lingvo pere de Esperanto. Nefrancaj samideanoj povas tre rapide lerni aŭ perfektigi en la franca lingvo per tiu metodo. Tiuj kiuj deziros resti post la 27-a de Julio bonvolu averti sufiĉe frue, por ke oni rezervigu al ili lokon.

TRIA PERIODO

27-a de Julio - 10-a de Aùgusto 1958

(Alveno : 27-7 ; foriro : 10-8)

Instruado de la Franca Lingvo al la alilandaj esperantistoj per Esperanto

CIUTAGE : 9 h. 30 - 11 h. 30 : Franca gramatika kurso.
15 h. - 16 h. 30 : Praktika parola kurso kaj studo de simpla teksto de franca verkisto.
21 h. - 22 h. 30 : Studo de francaj kantetoj elektitaj el la popolaj kantetoj ; diversaj ludoj, aŭdado de diskoj, paroladetoj, filmoj.

DETALA PROGRAMO

	9 h. 30 - 11 h. 30	15 h. - 16 h. 30	21 h. - 22 h. 30
27-a de Julio	Alveno de la partoprenantoj.	Sciigoj pri la vivo en la kastelo	
28-a de Julio	Prononcado de la franca lingvo. Prezenco de la verboj esti kaj havi.	Vizito de urbo Baugé kaj de la vendejo.	Aŭdado de francaj kantetoj.
29-a de Julio	Genro de la substantivo. Prezenco de la verboj.	Vizito de la kastelo kaj de la bieno. Lernado de fabelo de Guy de Maupassant.	Lernado de la kanteto : « A la claire fontaine ».
30-a de Julio	Nombro de la substantivoj. Imperfekto de la verboj.	Alveno en la hotelo. Daŭrigo de la fabelo.	Lernado de la kanteto : « Auprès de ma blonde ». Aŭdado de diskoj.
31-a de Julio	Kvalita adjektivoj. Futuro de la verboj.	En la restoracio. Daŭrigo de la fabelo.	Lernado de la kanteto : « Quand j'étais chez mon père ». Kanto aŭ paroladeto pri lando de partoprenantoj.
1-a de Aŭgusto	Verbo, subjekto, objekta komplemento. Personaj pronomoj. Kondicionalo.	Ekskurso al la kasteloj de la Loire-valo Sona kaj luma spektalo	
2-a de Aŭgusto	Demandaj vortoj. Simpla kaj malsimpla paseo.	En la stacidomo : vojaĝo. Lernado de teksto de A. Daudet : « La chèvre de M. Seguin ».	Kantado de lernitaj kantetoj. Aŭdado de esperantaj paroladoj.
3-a de Aŭgusto	Libera tempo		Vidado de filmoj.
4-a de Aŭgusto	Numeraloj. Kvanto. Adverboj. Malsimplaj pasintaj tempoj.	Vizito de la vendejo en Baugé.	Anekdotoj, historioj franclingve kaj esperante.
5-a de Aŭgusto	Ekskurso : Grotoj de Saulges, zoologia parko en La Flèche, aŭ vizito de Saumur, Angers		
6-a de Aŭgusto	Posesivaj kaj demonstrativaj adjektivoj kaj pronomoj. Pasivaj verboj.	Etaj aĉetoj : tabako, libroj, gazetoj, ktp... Daŭrigo de « La chèvre de M. Seguin ».	Paroladeto de alilandulo. Ludoj.
7-a de Aŭgusto	Tempo kaj loko de la ago. Imperativo. Pronominalaj Verboj.	En la poŝtoficejo. Daŭrigo de « La chèvre de M. Seguin ».	Fremdaj kaj francaj kantoj. Ludoj.
8-a de Aŭgusto	Kaŭzo kaj daŭro de la ago. Subjonktivo. Senpersonaj verboj.	En la vendejo aŭ en la magazeno : aĉetoj. Legado de franca gazeto.	Vidado de filmoj.

9-a de Aŭgusto	Relativaj pronomoj kaj relativaj subpropozicioj. Neregulaj verboj.	Interparolado pri la temoj lernitaj.	Adiaŭa vespero.
10-a de Aŭgusto	Foriro de la partoprenantoj		

N. B. — 1) Francaj Esperantistoj ĉeestos en la Kastelo dum tiu periodo ; dank'al ili la alilanduloj povos facile praktiki la francan lingvon.
2) Laŭ la deziro de la partoprenantoj oni povos elekti aliajn francajn verkojn kaj oni povos sanĝi la aktivajojn dum la noktokunvenoj.

KVARA PERIODO

10-a - 31-a de Aŭgusto 1958

(Alveno : 10-8 ; foriro : 31-8)

ESPERANTISTAJ KULTURAJ SEMAJNOJ

ĈIUTAGE : 9 h. - -11 h. 45 : **3 esperantaj kursoj.**
por la komencantoj (prof., S-ino Guillot).
por la praktikantoj (prof., S-ro Babin).
praktikado, studo de tekstoj, gramatiko, pedagogio (prof., S-ro Guillot).

14 h. - 16 h. **bindarto** (prof. J.-C. Dupuy).
plektarto

17 h. 30 - 18 h. 30 : **Interparolado** (per grupetoj, sub gvidado de la profesoroj).

21 h. - 22 h. 30 : **kulturaj aŭ amuzaj vesperkunvenoj** : komuna kantado kaj ludoj en Esperanto, kino, dancoj, tp.

DIMANĈO 17 : libera tago, ebloj por komuna ekskurso.

DIMANĈO 24 : ĉiujara kermeso.

DETALA PROGRAMO DE LA VESPERKUNVENOJ

Dimanĉo 10	Prezentado de la ĉeestantoj. Sciigoj pri la vivo en la Domo.	Lundo 18	Kantado, ludoj, dancado.
Lundo 11	Kantado, ludoj, dancado.	Mardo 19	Kantado. « Historio de E.K.D. » (S-ro Micard, prezidanto de EKD).
Mardo 12	Kantado, kiel fari « muntaĵon » (1) (S-ro Thebaud), dancado.	Merkredo 20	Kantado, ludoj, dancado.
Merkredo 13	Kantado, ludoj, dancado.	Jaŭdo 21	Kantado, filmo, diskutado pri la prezentita filmo.
Jaŭdo 14	Kantado, prezentado de « muntaĵo » (S-ro Thebaud).	Vendredi 22	Komuna preparado de la kermeso.
Vendredo 15	Kantado, filmo, diskutado pri la filmo prezentita.	Sabato 23	Komuna preparado de la kermeso.
Sabato 16	Kantado, ludoj, dancado.	Dimanĉo 24	Kermeso : pirotekniĥajo, balo.
Dimanĉo 17	Aŭdado de diskoj.	Lundo 25	Kantado, ludoj, dancado.
		Mardo 26	Kantado. Prezentado de « muntaĵo » pri E.K.D. (per grupo de partoprenantoj).

Merkredo 27	Kantado, ludoj, dancado.	Vendredo 29	Kantado, filmo, diskutado pri la prezentita filmo.
Jaŭdo 28	Kantado. Prezentado de « muntajo pri Esperanto (per grupo de partoprenantoj).	Sabato 30	Adiaŭa vespero, maskobalo, gaja kunveno.

(1) « muntajo » estas prezentado de temo per la parolo, la bildo, ra muziko.

KVINA PERIODO

De la 1-a ĝis la 20-a de Septembro

Amika Restado, Diversaj Kunvenoj

Sendube estos Esperanta-kurso de la 5-a ĝis la 14-a de septembro.

1958 - aj Aktivaĵoj en Grésillon

Dum la « Kulturaj Internaciaj Ferioj » okaziĝontaj en la Kultur-Domo de la 15-a ĝis la 27-a de Julio, prelegantoj parolos pri diversaj temoj. Unu el la prelegoj estas titolita : « La baza edukado de Unesco ». Sed kio estas « baza edukado » ?

La Universala Deklaracio pri Hom-rajtoj diras, ke ĉiu homo rajtas ricevi la plej altan gradon de edukado de li atingebla. Tiu artikolo koncernas ĉiu nacio, kies devo estas doni al ĉiu el siaj anoj la eblon ricevi tian edukadon ; kaj ĉiuj jam evoluintaj nacioj celas al tiu egaleco de homoj. Sed oni devas konsideri tiun antaŭenpaŝon al kompleta egaleco ankaŭ sur pli materia tereno : moral- kaj intelekt-nivelo de nacianoj konsistigas unu el la riĉajoj, kiuj faras nacion sana. Konsekvence ĉiuj naciestroj, kiuj konsideras sin respondecaj pri la feliĉo de sia popolo, devas fari sian eblon por atingi tiun egalecon koncerne edukitecon.

Sed nuntempe, kiam preskaŭ ĉiuj problemoj sin prezentas mondskale, ankaŭ la problemo pri edukado de la popoloj sin prezentas : nombro de nacioj estas nesufiĉe edukitaj, evoluintaj. Same kiel naciestroj devas zorgi pri la edukado de siaj anoj, la Mondo (ĝis nun : internaciaj organizaĵoj) devas zorgi pri la edukado de la diversaj landoj ; tio estas necesa por atingi ekvilibron de la mondo sur ekonomia kaj socia tereno.

Inter tiuj nesufiĉe evoluintaj landoj, kelkaj ankoraŭ konservas restaĵojn de granda antikva ĉivilizacio ; aliaj neniam atingis valoran civilizacion ; neniu plene profitas siajn naturajn riĉaĵojn pro manko de edukitaj anoj. Sed ĉu tiuj landoj estas pretaj ricevi edukadon ? En multaj el ili regnas malsato kaj malsano. Homo malsana kaj malsata ne multe interesiĝas pri edukiteco. La unua problemo estas sanigi kaj satigi ilin. Ĉu sufiĉus sendi al ili kuracilojn kaj manĝaĵojn el ekstere ? (Kiel ili pagus ?) Ne, oni devas montri al ili, kiel mem produkti manĝaĵojn, do kiel produktivigi la teron, por kreskigi arbojn, grenon, legomojn, por nutri bestojn. Intelekta edukado devas komenciĝi per ABC : instruado pri legado. Sciante, ke edukiteco kondukos ilin al plibonigado de iliaj vivkondiĉoj, la homoj bonvole venas sur la « lernej-benkojn ».

Tiun grandan laboron entreprenis Unesco sub la nomo « baza edukado ». Pri tiu problemo oni prelegos en la Kultur-Domo venontan someron.

Gramatikaj Respondoj

Ni dezirus, ke tiu gramatika anguleto estu via ; ke en ĝi estu pritraktataj tiu kaj tiu ĉi punktoj, kiuj interesas vin ; regulo, kiun vi ne bone komprenas, frazo al vi ne klara, kiun vi renkontas en libro aŭ revuo, aŭ esprimo kiun vi opinias erara. Sendu viajn demandojn al la jena adreso : P. Babin, 5, boulevard Buisson, Rochefort-sur-Mer. La respondoj aperos en la sekvanta numero de la « Kajeroj ».

Ĉi sube vi trovos la konsilojn donitajn de Dro Zamenhof en « Esperantisto », pri la uzado de akuzativo. Tiujn konsilojn oni trovas en « Lingvaj Respondoj ».

La akuzativo en nia lingvo neniam dependas de la antaŭa prepozicio (ĉar la prepozicioj per si mem neniam postulas ĉe ni la akuzativon), sed nur de la **senco.** La akuzativon ni uzas nur en tri okazoj :

a) por montri la suferanton de la faro (t.e. post verboj havantaj sencon aktivan), ekzemple « mi batas **lin** », « mi diras la **vorton** » ;

b) por montri direkton (t.e. movadon **al** ia loko, en diferenco de movado **sur** ia loko), se la prepozicio mem tion ne montras ; ekzemple ni diras « mi venas al la celo » (ne « al la celon »), ĉar « al » mem montras iam la direkton, sed ni devas diferencigi inter « mi amas iri en la **urbo** » kaj « mi amas iri en la **urbon** » (aŭ simple « iri la **urbon** ») laŭ tio, ĉu mi amas iri sur la stratoj de la urbo aŭ ĉu mi amas iri el ekstere en la urbon (« iri al la urbo » signifas nur aliri, sed ne eniri) ;

c) en ĉiuj okazoj, kiam ni ne scias, kian prepozicion uzi, ni povas uzi la akuzativon anstataŭ la prepozicio « je » ; ekzemple en la esprimo « mi kontentiĝas tion ĉi » la akuzativo ne dependas de la verbo « kontentiĝas » sed anstataŭas nur la forlasitan prepozicion « je » (= mi kontentiĝas je tio ĉi).

EL LA ESPERANTA LITERATURO

En ĉiu numero de la « Kajeroj » vi trovos eltiraĵon el bone konata kaj valora esperanta libro. Ni esperas, ke la legado de tiuj tekstoj interesos vin kaj instigos vin al legado de la tuta verko ? Por pligrandigi vian intereson ni proponas al vi la jenon : post legado de la eltiraĵo, traduku ĝin franclingven kaj sendu vian tradukon (kun afrankita koverto) al **S-ro Babin, 5, boulev. Buisson, Rochefort-sur-Mer** ; *via tasko korektita estos resendita al vi.*

La Omara virino

(el « Kredu min, Sinjorino », verkita de Cezaro Rossetti, eldonita de Heroldo)

... Estis mardo, kaj oni promesis, ke la foiro estos preta por malfermo je la venonta sabato. Dum la tagoj Liza kaj mi libertempis. Mi puŝis komercajn aferojn for de la menso. Mi supozis bonan negocon ĉe la foiro sed mi evitis antaŭkalkuli aŭ atendi tro multe. Mi ne povis imagi, kiel la foiro povus sukcesi, tamen kiu scias ? En komerca afero plej strangaj kapricoj de la sorto povas ja okazi, eĉ malgraŭ la plej serena aŭspicio.

Vendredon mi eniris la foiron kaj ordigis la standojn prepare je la morgaŭo. Ni aĉetis citronojn, kokinon, legomojn, ktp. Entute estis dekduo da standoj. La aliaj bazaruloj estis tre optimistaj, sed mi ne lasis min forporti de ilia entuziasmo. Sur la estrado montriĝos la « Omara Virino ». Vendrede vespere ŝi antaŭprovis sian prezentaĵon. Ŝi ruĝigis la vizaĝon kaj iris sur la estradon, kie staris tablo, kaj tie sur la tablo ni vidis virinan vizaĝon sen virina korpo, sed de ŝia kolo etendiĝis omaraj gamboj kun du tenajlaj ekstremaĵoj. Kiel la iluzio estis aranĝita, mi ne scias, sed mi konjektis, ke ĝi estas iel kreita per speguloj. Mi diris al ŝi :

« Omaro ne estas ruĝa ĝis post boligo. Ĉi devus esti nigra, se ĝi ja vivas, kiel vi prezentas. »

« Mi scias tion », ŝi ridis. « Sed boligita omaro pli longe restas freŝa, ol kruda besto nekuirita, do mi ne bezonas tiel ofte aĉeti novan, kaj cetere la ruĝa koloro estas pli sensacia. La scienca precizo ne tre gravas. Nur atendu ĝis morgaŭ kaj vi vidos la homojn veni amase por vidi min »

« Kaj kion vi faros, se oni volos vidi vin manĝi nekuiritajn fiŝojn, kiel asertas viaj reklamoj ? »

« Ho tute simple. Mi manĝos ostrojn », ŝi bonhumoris...

La Aventuroj de Steleto



Baldaŭ la someraj ferioj ! Sed, kien iri ?



Estus agrable ripozi kaj amuziĝi



Estus ankaŭ agrable kulturiĝi



Sed, kiel akordigi kulturon kun distro ?



Jen la solvo ! Mi iru al la Esperantista Kultur-Domo !

La mirakla fiŝkaptado

Iam, en kastelo, meze de multeplaĉa parko, restadis gestudemuloj. Studemaj ili ĉiuj estis sed ne tro seriozaj. Inter la cerbumad-periodoj (kaj kelkafoje dum la streĉigaj studadoj) eksplodis ridoj, ekflugis amuzaj paroloj, radiis vizaĝoj. Senzorge ĉiuj laboris aj amuziĝis, ludis kaj babilis. Ĉiu tute libere elektis sian plej ŝatatan tempo-pasigilon.

Ĉiumatene, tra la nebuleto, trans la ponteto, du siluetoj kun sako surdorse, vigle paŝis al la insulo : Mik kaj la Profesoro. Rapide, sur loko interarba, vermoj elsaltis el skatoleto sur hoketojn ; siblis du fadenoj tra la aero, vipis la akvon la fadenoj kaj ekatendis la du feliĉaj fiŝkaptad-amantoj. La loko pleniĝis de priĵŝaj revoj, prifiŝaj paroloj kaj profiŝe nervaj elŝprucoj de fumo. Dum la tuta mateno... Kaj tagmeze, elokventaj paroloj kaj gestoj malkovris por la profanuloj la belajojn kuŝantajn enakve, inter la kanoj. « Tiom longa estis la karpo, kiu rompis mian fadenon. » — « Tiom (iom malpli) longa estas tiu, kiu kuŝas sur la tablo en la kuirejo ». « Se la vento..., se la anasoj... » Malfeliĉaj feliĉuloj ! Ĉiuj pioniroj renkontas malhelpajojn ! Ĉiuj fiŝkaptantoj renkontas malamikajojn ! Sed kelkafoje ankaŭ... miraklojn ! Jen la miraklo.

Posttagmeze. La Profesoro promenas en la parko. Sed Mik, atente rigardas la ruĝan flosilon. Senspire, li rigardadas. La ruĝa punkto moviĝetas : sed nenio pli. Elspiro malstreĉas la Mik-an bruston. Nova atendado... Subito voko ŝiras la silenton : « S-ro Mik ! Al la oficejo ! » — « Ĉu urge ? » — « Ŝajnas, ke jes ! Eble telefon-voko. » Mik post lasta ekrigardo al la paca flosilo, rapidas, kunportante la certecon, ke fiŝo profitos lian neĉeeston por formanĝi la vermon senriske, Enirinte la oficejon, li demandas la dejoranton : « Oni petas min veni ĉi-tien. » — « Kial ? » — « Ĉu vi ne vokis min ? » — « Ne. Mi vokis F-inon Nik. » — « Mil diabloj ! » Kaj kuranta Mik, brue ferminte la pordon, trairas la herbejon, transsaltas la ponteton, kaj korpremante atingas la paradizan lokon. Febra rigardo vane serĉas la flosilon. Nenio ruĝa surakve ! Tremanta mano prenas la stangon, ĝin levas. Io peza ĝin arkigas. Ĉu karpo ? Ĉu ploto ? Certe ducent, tricent-grama ! Fine elakviĝas la fiŝo. Sed, kia strangaĵo ! Preninte ĝin en la mano, Mik konsideras... limandon ! La Mikaj esprimoj ne estas ĉiuj tradukeblaj (mi ne diras tradukindaj) esperanten, Bedaŭrinde, ĉar mankos io en tiu rakonto.





LA MAISON CULTURELLE

des Espérantistes Français

Société coopérative adhérente
à la Ligue de l'Enseignement

organise pour 1958 les séjours suivants :

Pâques 1958

Cours d'Esperanto — Reliure — Activités diverses

Du 15 Juin au 14 Juillet

Repos — Passage de caravanes
Cours pour débutants - Reliure - Activités diverses

Du 15 au 27 Juillet

Rencontre internationale

Du 27 Juillet au 10 Août

Le français aux espérantistes étrangers, GRACE A L'ESPERANTO

Du 10 au 31 Août

Nos semaines espérantistes et culturelles

Du 1er au 20 Septembre

Repos et rencontres diverses

Renseignements détaillés contre enveloppe timbrée à : *Maison Culturelle Espérantiste, Château de Grésillon, Baugé (M.-et-L.), ou à : H. Micard, Epineux-le-Seguin (Mayenne). Tél. 1.*

Sablé. — Imp. E. COCONNIER — Le Gérant : H. MICARD